

La kandidatoj al La Verko de la Jaro 1981, konversacio kun Giorgio Silfer

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 565-88A-2, 1982.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-88A/SRI-1982-88A-2-565-Claude-GACOND-La-kandidatoj-al-La-Verko-de-la-Jaro-1981-konversacio-kun-Giorgio-Silfer.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond kaj Giorgio Silfer, la direktoro de la Kooperativo de Literatura Foiro.

Sinjoro Giorgio Silfer, ni daŭrigu ĉi-semajne nian konversacion pri La Premio La Verko de la Jaro. Ĉu vi povus doni al ni la liston de la kandidatoj al la premio 1981-a.

GS.- La kandidatoj fakte estas ne la aŭtoroj, sed iliaj verkoj. En tio mi dirus, ke la referendumo spegulas iun kritikan vidpunkton pli proksiman al la nuntempa estetiko. Nome, ke oni ne tiom juĝas la aŭtoron, kiom lian artaĵon. La titoloj estas : *Ĉu li venis trakosme*, kies aŭtoro estas Valano kaj eldonisto Torben Kehlet, Stafeto ; *La Litomiŝla tombejo*, kies aŭtoro estas Karel Piĉ kaj eldonejo estas tiu Iltis en Saarlando ; *La Ŝtona Testamento*, aŭtoro Reino Eriksson, tiu ĉi estas la sola libro, kies eldonisto ne estas esperantista entrepreno, do eldonejo Kustannuskiila Oy en Finnlando ; *Regulus*, eldonita de Lina Gabrielli en Ascoli Piceno estas romano de Lorjak.

Cl.- Do, nun, se vi povas ion diri pri tiuj verkoj, ĉu ne ?

GS.- Mi dirus unuavice, ke kompare kun kelkaj antaŭaj eldonoj de la premio, Premio La Verko de la Jaro 1981-a prezentas tre bonan liston da kandidatoj el kvalita vidpunkto. Fakte, oni devas vere legi ĉiujn librojn, ĉar sendepende de tiu, kiu gajnos, ili ĉiuj estas tre legindaj. *Ĉu li venis trakosme*, estas la tria romano el la serio 'ĉu-a' en la serio de nia esperanta Simenon, Johán Valano, krimromano, kies protagonistoj estas ankoraŭ Jano Karal, la policinspektoro kaj lia familio. Ĝi estas eble malpli forta ol pli fruaj eldonoj, pli fruaj en la serio, sed ĝi aliflanke enhavas kelkajn originalajn aspektojn, ekzemple ĝi havas tiun sciencfikcian aŭ pseŭdo-sciencfikcian fonon, tiun spionisman fonon ankaŭ, kiu larĝigas la foje tro limigitan kampon de detektivromano de nigra literaturo.

Cl.- *La Litomiŝla tombejo* havas preskaŭ interlingvistikan karakteron, ĉu ne ? Provoj je vortoj kaj pri tio ni sufiĉe multe parolis al niaj geaŭdantoj ĉar ni analizis la verkon, do ili eble jam havas impreson pri ĝi. Eble vi tamen diru vorton laŭ via vidpunkto.

GS.- Mi volus diri vorton ĝuste el la vidpunkto de literatura kritikisto, kiu do ne speciale ŝokiĝas pri kelkaj novaj vortoj aŭ simile, sed volas unuavice rigardi la estetikan valoron de la verko. Pri la *Litomiŝla tombejo* fakte estis tre kontrastaj opinioj. Estis tre karaj amikoj miaj, kiuj parolis ege malbone pri ĝi, aliaj kiuj ekzaltis ĝian valoron. Mi dirus, ke en ĝi estas el estetika vidpunkto unu grava novaĵo kaj tio estas la vera valoro de la libro, kvankam bedaŭrinde verŝajne oni rememoros ĝin en la esperanto-literaturo nur pro la fakto ke estas amaso da neologismoj. Do la vera estetika karakterizaĵo de tiu libro estas, ke tri virinoj ludas gravan rolon. Kaj en la esperanto-literaturo ni rimarkis, ke bedaŭrinde virinoj neniam estas speciale gravaj kiel protagonistinoj, apenaŭ ekzistas verkistoj en esperantujo, kiuj kapablas priskribi virinon, penetri la virinan psikologion kaj simile. Pro tio *La Litomiŝla tombejo* estas interesa. Mi ne volas diri ĉi tie, ĉu laŭ mi la aŭtoro sukcesis aŭ fiaskis en la tasko prezenti la psikologion de tiuj tri virinoj. Tion mi lasas al la referendumontoj.

Cl.- Sekvas la poemaro, *La Ŝtona Testamento* de la finno Reino Eriksson.

GS.- Mi povas diri, ke ĝi tre agrable surprizis min. Mi sciis jam ke Eriksson verkas en la finna lingvo kaj estis aparta ĝojo por mi ekvidi, ke li ankaŭ en esperanto publikigas. Finfine, ni estis kolegoj en Finnlando kaj mi devas diri, ke en granda parto mi peris lian intereson al la esperanto-literaturo, certe ne lian originalan verkemon, ĉar tio estas lia persona merito, lia persona talento. Persone miŝatas legi *La Ŝtonan Testamenton* ĝuste pro tiu ĉi subjektiva sinteno, tiu ĉi subjektiva aliro, kiun mi havas al Finnlando kaj la finna medio. Tiu libro portas al mi multon el la fora Nordo kaj do ĝi estas la plej ŝatata de mi.

Cl.- Ĉu vi legis, do en la du lingvoj, la poemojn, kiuj havas verŝajne saman provon esprimi sian penson, la penson de la aŭtoro. Ĉu vi ricevis saman impreson legante en tiuj versioj, aŭ ne ?

GS.- Tiu ĉi estas vere interesa punkto, ĉar ne ofte okazas, ke la sama aŭtoro verkas dulingve la saman tekston. Mi devas diri, ke en kelkaj kazoj oni vidas, ke la haŭto estas esperanta kaj la koro finna. Do, kio permesas ofte tre agrablajn kombinojn, aliajn fojojn ne. Mi konsilus legi ĉi tiun poemaron precipe por tiuj personoj, kiuj volas iom pli kompreni la fenomenon de la fora Nordo.

Cl.- Kaj nun ni venu al *Regulus de Lorjak* !

GS.- Tiu ĉi estas la kvara aŭ eĉ kvina romano de mia amiko Lorjak el Parizo. Mi opinias, ke ĝi estas la plej ampleksa, verŝajne ĝi estas ankaŭ la plej ambicia. Temas pri aventur-romano, kiu situigas la protagonistojn en la Parizo de la dekseka, deksepa jarcento. Ĝi rememorigas eventuale la stilon de Dumas aŭ simile, almenaŭ ĝi povas trovi certan fonon en tio. Verŝajne Lorjak ĉi tie sukcesis multe pli bone kompare kun antaŭaj romanoj. Fakte, kaj Lorjak kaj Valano donas la eblecon fari komparojn pri ili rilate al ilia antaŭa produktado. Kaj mi dirus, ke *Regulus* montras progreson de Lorjak. Dum Johán Valano ne montras tiom da progreso kompare kun la antaŭaj romanoj. Aliflanke mi kredas, ke *Regulus* estis jam preta antaŭ multaj jaroj. Do estas malfacile fiksi iun kronologian sinsekvon kaj tiam kompari.

Cl.- Do, mi kuraĝigas niajn geaŭdantojn aĉeti kaj legi la verkojn referendumotajn kaj se ili volas volas, voĉdoni, aboni la revuojn *Literatura Foiro* kaj *Koncize*.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Giorgio Silfer parolis pri la kandidataj verkoj al La Premio La Verko de la Jaro 1981-a. Ĝis reaŭdo!